

Stranga Antarktia bakterio kiu vivas nur kun aero povas esti ŝlosilo por trovi eksterteran vivon



Sekureca Konsilio de UN
longigis oficperiodon de
misio en Sud-Sudano

Nova Ĝeneva
pacintertraktado pri
Sirio finiĝis sen
atenditaj rezultoj

Trezoro Huang Yinbao:
la Esperantisto de la
Jaro 2017

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Nova Ĝeneva pacintertraktado pri Sirio finiĝis sen atenditaj rezultoj

La Siria registaro kaj la opozicia delegacio akuzis unu la alian pri starigo de malkonvenaj antaŭkondiĉoj p. 03

Sekureca Konsilio de UN longigis oficperiodon de misio en Sud-Sudano

Ĝis 15a de marto, 2018 p. 03

Stranga Antarktia bakterio kiu vivas nur kun aero povas esti ŝlosilo por trovi eksterteran vivon

Nova tipo de bakteriario p. 04

6-jaraĝa knabo enspezis US\$11mln provante ludilojn

Jutubkanalo p. 05

Afrikaj ŝtatoj ne sufiĉe investis en sciencaj esploroj!

Neniu afrika lando elspezas pli ol 0,5% de sia buĝeto por esplorado p. 06

TREZORO Huang Yinbao: la Esperantisto de la Jaro 2017

Li iniciatis kaj ekredaktis la Esperanto-version de Unesko-Kuriero p. 07

Hodiaŭe

Arthur C. CLARKE; Jane AUSTEN; Olavo BILAC; kaj Ŝtono p. 08

Nova Ĝeneva pacintertraktado pri Sirio finiĝis sen atenditaj rezultoj

La nova Ĝeneva pacintertraktado pri Sirio finiĝis ĵaŭde [14 dec 2017] pli frue je unu tago ol la planita dato. Speciala sendito de la UN pri Sirio, Staffan DE MISTURA, diris, ke la intertraktado ne povis akiri atenditajn rezultojn malgraŭ grandaj penadoj de UN en la pasintaj du semajnoj.



DE MISTURA diris ĵaŭde [14 dec 2017] vespere en gazetara konferenco, ke la Siria registaro kaj la opozicia delegacio akuzis unu la alian pri starigo de malkonvenaj

antaŭkondiĉoj, kio perdigis al la du partioj la oran oportunon antaŭenigi la pacan procezon.

La sendito diris, ke estis pozitiva signo, ke la Siriaj opozicioj unuafoje formis komunan delegacion por la intertraktado kaj esprimis volon rekte trakti kun la registaro. Sed delegacio de la Siria registaro rifuzis diskuti aliajn temojn krom tiu pri batalo kontraŭ terorismo, opiniante, ke la insisto de la opozicioj pri eksigo de prezidento Bashar al-Assad estas antaŭkondiĉo por la pacintertraktado.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Sekureca Konsilio de UN longigis oficperiodon de misio en Sud-Sudano

La Sekureca Konsilio de UN ĵaŭde [14 dec 2017] adoptis rezolucion, kiu longigas la oficperiodon de la Misio de UN en Sud-Sudano ĝis 15a de marto, 2018.



La Sekureca Konsilio adoptis ankaŭ deklaron de prezidanto pri la situacio en Sud-Sudano. La deklaro esprimis maltrankvilon pri la politika, sekureca, humaneca kaj ekonomia situacio en la lando kaj urĝis ĉiujn partiojn de konflikto haltigi batalon

kaj aktive partopreni en la paca procezo.

En julio de 2011 Sud-Sudano deklaris sendependiĝon el Sudano. En la sekva monato la Sekureca Konsilio de UN decidis establi Misio de UN en Sud-Sudano, kaj poste ĝi kelkfoje longigis la oficperiodon de la misio. En decembro de 2016, la Sekureca Konsilio decidis longigi la oficperiodon de la misio ĝis la 15a de decembro de 2017.

Yu
Ĉina Radio Internacia



Stranga Antarktia bakterio kiu vivas nur kun aero povas esti ŝlosilo por trovi eksterteran vivon

Sciencistoj trovis novan tipon de bakteriario, la plej tolerema de organismoj, kiu povas postvivi nur uzante la ĥemiaĵojn en aero – kaj la malkovro povus ŝanĝi nian pensmanieron pri vivo sur aliaj planedoj.

Estis trovitaj mikroboj en Antarktio kiuj povas vivi kun dieto de hidrogeno, karbona monoksido, kaj karbona dioksido, restante vivantaj en la plej ekstremaj kondiĉoj kie aliaj fontoj de manĝaĵo kaj energio estas nesufiĉaj.

Ĉu malalta-nivelaj vivoformoj sur aliaj planedoj vivas nur kun la gasoj en la atmosfero? Laŭ la teamo el la Universitato de Nova Suda Kimrio en Aŭstralio, tio estas ebleco kiun ni nun devas konsideri.

Ĉefa esploristo Belinda FERRARI diras: “Antarktio estas unu el la plej ekstremaj biomedioj sur Tero, tamen la malvarmaj,

mallumaj, sekaj, kaj dezertaj regionoj neatendite estas hejmo por multaj diversaj mikrobaj komunumoj.”

“La granda demando estis, kiel la mikroboj povas postvivi kiam ekzistas malmulta akvo, kaj la grundo enhavas malmulte da organika karbono kaj ekzistas malmulta kapablo por produkti energion el la Suno pere de fotosintezo dum la vintra mallumeco.”

Frostigaj temperaturoj, ege malmulta akvo, monatoj da mallumeco, forta ultraviola radiado, kaj la vetero de frostigo kaj degelo-cikloj: neniuj de tiuj kondiĉoj estas precipe kondukema al nutri vivon.

Sed studoj montris ke vivo tie ekzistas. do kiel ĝi postvivas sen la kutimaj energio fontoj, ĉu tipe karbono aliformiĝis al sukero pere de fotosintezo?

Por respondi al tiu demando, esploristoj, Robinson RIDGE kaj Adams FLAT, prenis grundo-specimenojn el du sen glaciaj partoj de la kontinento, ili faris tion ĉar iu ajn tipo de rekonebla vivo aŭ bakterio-manĝaĵo fonto pli malpli ne ekzistas.

Rekonstruite la genarojn de 23 mikroboj, studante la mikroban DNA de grundo kun plumberpafila sekvencado metodo, uzante malgrandajn sekciojn de DNA por rekrei la tuton, la sciencistoj povis identigi du grupojn de nekonataj bakterioj kiujn ili nomis WPS-2 kaj AD3.

Kaj plue, la dominantaj specioj en la grundo havis genojn kun alta afineco al Hidrogena kaj Karbona monoksido, permesante ilin rikolti tiuj gasoj el la aero kun sufiĉe rapida proporcio por subteni vivon.

Malmulta sunlumo, neniuj tervarmenergio, malmultaj nutraĵoj, ne gravas. tio estas la unua aero-manĝanta vivoformo kiun ni vidis, eĉ se tio estas pleje dormema bakteriario.

La sekva paŝo estas kalkuli kiel disvastiĝinta estas tiuj tipoj de bakteriario, ĉu en Antarktio ĉu aliloke sur la Tero. Fine, tiaj mikroboj eble troveblas sur aliaj planedoj, kiuj bezonas neniun alian manĝaĵon ol la aero kiun ili spiras.

FERARRI diras: “Tiu ĉi nova kompreno pri kiel vivo povas ekzisti en fizike ekstremaj kaj sen-nutraĵaj biomedioj kiel Antarktio malfermas la eblecon de atmosferaj gasoj subteni vivon sur aliaj planedoj.”

La eltrovaĵoj estis eldonitaj en *Naturo*.

Fonto (Angla): sciencealert.com

scienco.ir

6-jaraĝa knabo enspezis US\$11mln provante ludilojn

La usona knabo Ryan (6-jaraĝa) ĉefrolas ĉe la jutubkanalo “*Ryan Toys Review*”, elpakante ludilojn kaj ludante per ili.

Laŭ la esploro nomata “La plej bone salajrataj steluloj de Jutubo tutmonde”, fare de la revuo *Forbes*, tiu kanalo de Ryan rangas je la oka pozicio inter tiuj kiuj plej enspezas – ĝia enspezo de 2016 trafis 11 milionojn da usonaj dolaroj.



Ekde la komenco de tiu jutubkanalo en la jaro 2015, ĝi jam akumulis 16,87 miliardojn da vidoj.

La kanalo estas mastrumata de la familio de Ryan, ĉefe de lia patrino, kiu klarigis pri ĝia starigo. Kiam li estis 3-jaraĝa, tiam li oftege estis spektanta tiajn recenzajn kanalojn pri ludiloj, kaj li demandis al ni: “Kial mi ne estas en Jutubo, same al tiuj infanoj?” Do, tiam responde al li ni diris: “Jes, ni povos fari tion”.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

Afrikaj ŝtatoj ne sufiĉe investis en sciencaj esploroj!

Utiligante la ĉiutrian pintan renkonton inter la Eŭropa Unio kaj la Afrika Unio fine de novembro en Ebur-Bordo, afrikaj esploristoj postulas ke la kontinentaj registaroj pliigu la buĝetojn por scienco kaj teknologio.

Estas alarma fakto. Neniu afrika lando elspezas pli ol 0,5% de sia buĝeto por esplorado. Laboratorioj de bona teknika kvalito por taŭga kaj efika esploro estas raraj.

Rezultas, laŭ Unesko, ke Afriko havas 90 esploristojn el miliono da loĝantoj kontraŭ preskaŭ 3 400 el miliono da loĝantoj en evoluintaj landoj. Do hodiaŭ, la kontinento produktas nur la 2% de sciencaj artikoloj publikigitaj tutmonde. Tamen en 1980, 54 afrikaj ŝtatoj jesis en Lagos (Niĝerio) sur agadplano altigonte kreditojn asignitajn por esplorado ĝis 1% de siaj buĝetoj en 2000.

Bedaŭrinde, 27 jarojn poste, tiu celo ŝajnas neatingebla. "Oni povas certe kompreni la multajn limigojn kaj diversajn okupaĵojn de afrikaj gvidantoj sur pluraj frontoj samtempe, inkluzive de la prioritatoj donitaj al sano kaj klerigado, rekonas Dr. Daouda AïDARA, biologo, iama prezidanto de la Universitato Nangui Abrogoua Ebur-Marbordo kaj prezidanto de la Akademio de sciencoj, artoj, kulturoj de Afriko kaj la afrika diasporo (ASCAD). Sed unu neneigebla fakto estas ke estas la landoj, kiuj investis en la trejnado de homaj rimedoj en scienco kaj teknologio kiu estas hodiaŭ ĉu emerĝaj ĉu evoluigitaj."

Tial la sciencistoj de la kontinento decidis mobiliziĝi. Alvoko diranta "Abiĝano Alvoko" cirkulis por ĉi-tiu celo en la akademioj de sciencoj, esploradoj organizoj kaj universitatoj. Tiu teksto alvokas afrikajn gvidantojn krei financon

mekanismon por subteni esplorojn en daŭro, por kuraĝigi la formadon de novaj teamoj por investi en efika ekipaĵo kaj bonkvalitaj. Ĝi povus esti bazita sur la Eŭropa Esplora Konsilantaro, la Eŭropa mekanismo por financado de esploroj kiu estas nun 10 jaraĝaj kaj kiu estis sukceso. La mesaĝo de

ĉi-tiu "Afrika Esplorkonsilio" ne celas

Okcidentajn organdonacantojn aŭ eŭropajn organizojn, kiel ekzemple la IRD, kiuj kunlaboras depost jardekoj al la apero de sukcesaj afrikaj esploradoj. "Ilia helpo, kvankam tre estimita, en si mem ne sufiĉas por daŭra rezolucio de ĉi-tiu specife afrika problemo. Tial

estas niaj registaroj kiuj devu fari la necesajn financajn penojn favore al scienco, tiel ke ĝi estas daŭrigebla levilo por evoluo de niaj landoj kaj fina alternativo, tra lia induktitaj efikoj, por elmigrado danĝera de afrika juneco al la Okcidenton "klamas Daouda AïDARA

La Ebur-Bordaj esploristoj do pledas por ke ĉiu lando portu ĝiajn penadojn en ĝia propra potencialo disvolvigenda. "En Ebur-Bordo, ekzemple, kiu havas riĉan agrikulturan potencialon, estas evidente necese investi en agrikulturaj esploradoj," li diras. Sed aliaj landoj povus anstataŭe elekti renovigeblan energion, maran teknologion, la ciferecan ekonomion ktp. La subskribintoj de tiu alvoko volas "Afrikan vidangulon" de la scienco. "Ni profitu el la kapabloj akiritaj de niaj junaj esploristoj en laboratorioj Nordaj por adapti niajn endogenajn disvolviĝajn bezonojn" diras Daouda AïDARA.

La centra temo de la EU/AU-kunveno okazinta la 29-n kaj 30-an de novembro en *Abidjan* estas "investo en juneco." La ondoj de migrado inter la du kontinentoj ne fremdas al ĉi-tiu elekto. Sed intertraktantoj ankaŭ konsideras la fakton, ke Afrika populacio estos pli ol duobla en 2050 por atingi 2,4 miliardojn da homoj plejparte junaj.



Subsahara Afriko kreu 18 milionojn da novaj laborpostenoj jare ĝis 2035! Sciencistoj do ĉeestis en *Abidjan* por memori siajn gvidantojn, ke scienca evoluo estas ŝlosila por krei ĉi tiujn

laborpostenojn en novaj sektoroj de la ekonomio.

Anthony LUCAS
ISAE

TREZORO Huang Yinbao: la Esperantisto de la Jaro 2017

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran

proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William

AULD. En 1999 lin sekvis Keppel ENDERBY. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans BAKKER, Mauro LA TORRE kaj Jouko LINDSTEDT. Poste laŭreatiĝis Osmo BULLER (2001), Michel Duc GONINAZ (2002), Dafydd AB IAGO (2003), Helmar FRANK (2004), Povilas JEGOROVAS (2005), Bertilo WENNERGREN (2006), Peter ZILVAR (2007), Ilona KOUTNY (2008), Aleksander KORJENKOV (2009), Katalin KOVÁTS (2010), Dennis KEEFE (2011), Peter BALÁŽ (2012), Mark FETTES (2013), Mireille GROSJEAN (2014), Chuck SMITH (2015) kaj Stefan MACGILL (2016).

En 2017 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis la dudekan fojon. Ĉi-jare 17 kandidatigantoj proponis 20

kandidatojn, al kiuj 18 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

TREZORO Huang Yinbao — 11 voĉoj
HORI Jasuo — 8 voĉoj
Richard DELAMORE (Evildea) — 5 voĉoj




Kvar kandidatoj ricevis po 2 voĉojn, ses kandidatoj ricevis po unu voĉon.

TREZORO Huang Yinbao [黄银宝 Huáng Yínbǎo], 55-jara ĉina agronomo, ekonomikisto kaj entreprenisto, prezidanto de la Esperanto-Centro

Ora Ponto, kunfondinto de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio, estas elektita la Esperantisto de la Jaro 2017 pro tio, ke en 2017 li iniciatis kaj ekredaktis la Esperanto-version de *Unesko-Kuriero*, kunmetis por ĝi tradukteamon, kaj krome lanĉis la sendependan revuon *Tra la Mondo*.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2017 TREZORO Huang Yinbao, kiu estas la unua aziano, ricevinta ĉi tiun honoran titolon!

Halina GORECKA
La Balta Ondo



Arthur C. CLARKE

Arthur Charles CLARKE (naskita la 16-an de decembro, 1917 en Anglio; mortinta la 19-an de marto, 2008 en Srilanko) estis brita verkisto kaj inventisto. Li verŝajne estas plej fama pro sia sciencfikcia romano *2001: A Space Odyssey* ("2001: Kosma Odiseado"), kiu ankaŭ estas filmo.

En Esperanto aperis: *Supereco; En la kometon; Provizoreco*.

Vikipedio

Jane AUSTEN

Jane AUSTEN [ĝejn osten / 'dʒeɪn 'ɒstɪn] naskiĝis la 16-an de decembro 1775, en Steventon, mortis la 18-an de julio 1817, en Winchester) estis brita verkisto. Ŝi estis onitakse unu el la plej gravaj anglalingvaj aŭtoroj de la 19-a jarcento.

En Esperanto aperis: *Fiereco kaj antaŭjuĝemo*.



Vikipedio



Olavo BILAC

Olavo Brás Martins dos Guimarães BILAC (16-a de decembro 1865 — 28-a de decembro 1918) estis brazila parnasanista poeto, naive naciisma, alinomata "Princo de Brazilaj Poetoj". Verkis la brazilan *Himnon al la Flago*, unu el la kvar oficialaj himnoj de Brazilo. Li apogis Esperanton en la frua 20-a jarcento, kvankam li mem ne lernis Esperanton.

Vikipedio



Bildo de la tago

Skulptita ŝtono de *Newgrange* (Irlando).

Vikipedio